

Saluton Manfred,
jen mi sendas al vi la artikolon, kiun vi petis.
Salutojn ekde Santa Eulària
Gereon

Sovaĝiĝintaj kaproj sur baleara insuleto

La roka insuleto Vedrano (katalune: es Vedrà) situas sudoccidente apud la baleara insulo Ibizo (katalune: Eivissa). Kun siaj 382 metroj ĝi estas la tria plej alta insulo de la Baleara Insularo. De Ibizo ĝi prezentas spektaklan vidaĵojn. Ĝi loĝigas en siaj 60 hektaroj unikajn flaŭron kaj faŭnon kun du endemaj subspecoj: la asteraco *Santolina chamaecyparissus ssp. vedranensis* kaj la heliko *Trochoidea ebusitana vedrae*. La lacerto *Podarcis pityusensis vedrae* estas dividata endemulo de Vedrano kaj la najbara, pli malgranda insuleto Vedranejlo (katalune: es Vedranell). Vedrano estas naturrezervejo kaj oni rajtas ĝin viziti nur kun speciala permeso.

Antaŭ proksimume 20 jaroj kelkaj personoj surigis kaprojn sur la insulon, kie ili evoluiĝis ad esti sovaĝa populacio. Estante neozooj, la kaproj damaĝis la vegetaĵon kaj kontribuegis al la erosio. Ĉar la insuleto ne havas dolĉan akvon, la kaproj nur povis drinki akvon de la rozo kaj de la plovo. Neniu sin sentis respondeca pri la kaproj kvankam la insulet-proprietuloj (katalune: vedraners) ĝis antaŭ malmultaj jaroj ĉiujare holis kapridojn por la Pasko-fritaĵo. Ĉiun jaron mortis pluraj kaproj pro soifo kaj malsato. Tiu problemo graviĝis en la vintro de la 2015a kaj 2016a jaro pro la nekutima sekeco. La plej multaj kaproj estis malsanaj. La naturprotektistoj sciis ke la kaproj devis malaperi de la insulo. Estas komune konate, kiujn damaĝojn faras sovaĝiĝintaj kaproj en insulaj ekosistemoj. Ekzistas scienca reserĉo pri la prokapraj damaĝoj sur Vedrano, sed ial ĝi ne estas publike legebla. Klare estas ke kelkaj plantspecoj sufris grandan plimultigadon. Tio estas tre klare alia afero ol la tradicia kaprotrenado sur la insulo Ibizo, migra herdotenado kun miksitaj kapraj kaj ŝafaj bestaroj; transhumanco, kiu estigis la garigon, kulturpejzaĝon kun ĝia altestimata flaŭro.

La naturprotektistoj diskutis pri la metodoj kiel forigi la kaprojn. Finfine la respondeca medikonsilanto post multaj pensadoj decidis ke la ununura realigebla metodo estis ilin pafmortigi. Sur Majorko tio estas normala: Jaron post jaro oni pafmortigas multajn sovaĝiĝintajn kaprojn por protekti la unikan flaŭron de la montaro.

Multegaj personoj pensas ke ekzistis aliaj metodoj. Sed estis klare, ke necesis agi, kaj rapide pro la soifego. Kaj neniu alia agis. Tamen kelkaj politikaj partioj, kelkaj gazetoj kaj multegaj personoj protestas kontraŭ la decido. Personoj, kiuj neniam antaŭe montris intereson pri iuj ajn kaproj, kiuj neniam faris ion por iu kapro, kiuj ne percibis la sufradon de la soifaj kaj malsanaj kaproj sur Vedrano, kiuj faris nenion por plietikigi la besttenadon, subite pretendas paroli nome de la kaproj. Ili faras manifestaciojn, gvidataj per la insulet-proprietuloj.

La naturprotektistara organizaĵo GEN-GOB komentis ke la malaperigo de la kaproj estas la unua bona novaĵo ekde multa tempo. Nun tiu organizaĵo kaj la konsilanto ricevas minacojn, eĉ estis murdminacoj kontraŭ la konsilanto.

La konsilanto daris eksplikaĵon, kial laŭ lia opinio ne estis aliaj metodoj forigi la kaprojn. La ideo forigi la kaprojn vivantaj, laŭ la prezentado de la medikonsilanto signifintus: Iu kaptintus la timemajn kaprojn, kiuj ne estis kutimiĝintaj al homa kontakto, en apenaŭ alirebla tereno kaj ilin portintus per tiu tereno al la boato. Helikoptero ne povas proksimiĝi al multaj lokoj pro la terena

formo. La uzado de anestezopafiloj ankaŭ ne estis praktikebla tial ke en tia tereno la anestezigitaj kaproj povintus fali kaj sin lezi serioze. Kaj estas klare, ke tia transporto estintus tre stresa por la homtimemaj kaproj.

Se tamen oni holintus la vivantajn kaprojn, estintus la demando kion fari kun ili. Verŝajne neniu besttenanta kamparano kaj neniu paŝtisto havintus intereson en tiom timemaj kaj plejparte malsanaj kaproj. Ankaŭ ekzistintus leĝa problemo: Pro la epidemileĝo oni ne rajtintus introduki la eble malsanajn kaprojn en alian kaprogrupon. Do la fino estintus la buĉado de la kaproj, kun la avantaĝo ke la viando utilintus manĝaĵe por homoj kaj hundoj anstataŭ por vulturoj. Dum ke aliloke multaj homoj luktas pro buĉado sen multa transportado de la buĉontaj bestoj, sur Ibizoj multaj memdeklaritaj bestprotektistoj senkonscie luktas pro sufriga transportado de la kaproj.

Pro la malfacileco, aŭ eĉ neebleco de aliaj solvoj, multaj naturprotektistoj apogas la decidon mortpafi la kaprojn. Kvankam estas timo ke la proprietuloj resurigos kaprojn, momente estas solvita la problemo de la neozooj, kaj la vegetaĵo povas reevoluiĝi, lasante spacon ankaŭ por sovaĝaj bestoj kiel la troglodito (*Troglodytes troglodytes*, birdeto kiu nestas en arbustaro) kiu nun, sen la ĝenado pro la kaproj, repovas kovi.

Gereon Janzing (Balearoj)

(gravas la enhavo; se iu emas korekti - bone)